

# **KULTUROJ DE DAŬRIPOVO (KdD) KAJ TRANSDISCIPLINECO - LINGVOJ, ARTOJ KAJ VALOROJ EN LA DIALOGO DE KULTUROJ**

Ĉi teksto prezentiĝas kiel idearo-koncepto de la **Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE)**, internacia kaj transkultura unuiĝo de ekopartie ligataj kaj partisendependaj samideanoj,, kiuj engaĝiĝas por ekologie daŭripova nuntempo kaj futuro de nia mondo kaj enordigo de la organizita Esperanto en tiun. (1) Ĉi engaĝiĝo okazas kvazaŭ kiel parto de la **Agendo 21** de la Unuiĝintaj Nacioj. (2)

Jen la baza logiko kaj strukturaj-dinamikaj elementoj de la "Kulturoj de Daŭripovo (KdD)". (3)

Regas unuanima mondvasta interkonsento pri la du neforigeblaj faktoj de la homa ekzisto: La rolo de **la homo kiel (nur) parto kaj partnero de la naturo** kaj la **limigiteco de nia unu komuna Planedo Tero**.

La homo kreas la kulturon, kiu lin stampas-gvidas, li estas "strukturita strukturanta strukturo". **Kulturo** ĝenerale estigas kaj regulas la rilatojn de la homoj kaj inter si kaj al la naturo, t.e. la vivmedio. La homaro aktuale konfrontas du pliakriĝantajn krizojn, tiun pri sociala justeco kaj tiun pri ekologia stabileco: la breĉo inter riĉuloj kaj mizeruloj ĉiam pligrandiĝas kaj la materialaj kaj sistemaj resursoj de nia Planedo kaj ties biosfero ĉiam pli malgrandiĝas - militoj, migrantofluoj kaj la klimatoŝanĝigo estas la ĉie observeblaj rekoniloj pri tio.Ĉi krizoj transpaŝas landlimojn kaj generaciojn. Ili estas homfaritaj kaj pro tio krizo de la kulturo.

La problemo estas, ke la krizo de justeco devas esti solvata sen plua akriĝo de la krizo de la vivmedio. Ni bezonas ambaŭ: justan mondon kaj sanan medion. "Sociala vido kaj pura aero!" - jen la slogano...

Ekde la Rio-Konferenco de la UN en la jaro 1992 (4) validas por la tutmonda evolu(ig)o de la homaro la tri neintertrakteblaj universalaj gvidprincipoj:

- 1. Paco,**
- 2. Homaj Rajtoj, kaj**
- 3. Daŭripovo.**

Tio signifas, ke ĉiuj decidoj en la kvar kampoj de

- 1. ekonomio**, t.e. la mondo de publika bonstato-bonfarto,
- 2. ekologio**, t.e. la mondo de vivopovo,
- 3. socialo**, t.e. la mondo de egaleca justeco, kaj
- 4. kulturo**, t.e. la mondo de vivindeco

mezurendas je tio, ĉu ili servas la pacon, kongruas kun la homaj rajtoj kaj akordiĝas al la kriterioj pri daŭripovo. En la tensiokampo de ekonomia, ekologia, sociala kaj kultura daŭripovoj racie-prudente prioritatas la celo de ekologia daŭripovo, ĉar la protektado-konservado de la naturaj (biosferaj) vivokondiĉoj estas la fundamenta antaŭkondiĉo por kaj la ekonomia kaj la sociala kaj la kultura stabilecoj. (5) **La social-ekologia daŭripovo hodiaŭ ne estas opcio, sed porekzista demando, trafanta ĉiun.** Laŭ UNESCO daŭripova evoluo estas sen alternativo. (6, 7)

**Social-ekologia daŭripovo** do konsistas el:

1. Ekonomie prudenta agado, orientata je social-ekologie etika responsiva investo de mono kaj je la publika bonstato.
2. Ekologia respondeco pri stabila biosfero, t.e. maldisipo pri resursoj per konsekvenca reciklado kaj ŝparemo, decentraj strukturoj, konsekvenca utiligo de regenerablaj energioj, konsekvenca reciklado, reduktado de danĝeraj kemiaĵoj kaj radiosotopoj, limigado de setlado kaj de la mondloĝantaro. (8)
3. Socialaj justeco kaj egaleco.
4. Kultura ekvilibro de ekonomio, ekologio kaj socialo laŭ etiko de respondeco kadre de transkultureco kaj transdisciplineco, t.e. kulturoj de daŭripovo, KdD.
5. Intra- kaj intergeneracia kaj surloka-tutmonda perspektivo.

Gravas ĉikuntekste la urĝa kaj daŭra insistado pri la **foresto de milto kaj okupateco**. Dekomenca pacpolitikokaj moderigo pri konfliktoj devas esti daŭripova en si mem kaj ja estas jam delonge principaj duboj, ĉu milita forto kaj perforto povas "pavumi" la vojon al "justa paco", ne parolante pri stabila biosfero.

Estas kvar bazaj gravaj dokumentoj, kiuj fine kondukis al ĉi nuntempe establita koncepto pri daŭripova evoluo:

1. La studo "Limoj de Kresko" de la Klubo de Romo", 1972. (9)
2. La koncepto "Kio nun? Alia evoluigo." de la Fonduso Dag Hammarskjöld, 1975. (10)
3. La Brundtland-Raporto "Nia Komuna Estonteco" de la UN, 1987. (11), kaj
4. La dokumentoj de la Rio-Konferenco de la UN, 1992, aparte de la Agendo 21. (2)

La **koncepto de "Kulturoj de Daŭripovo (KdD)"** havas du perspektivojn koncerne ekoevoluiĝon (12):

1. La rolo de kulturoj (laŭ UNESCO (13)) ĉe la planado pri daŭripova evoluigo, kaj
2. la aplikado de ideoj de daŭripovo je kulturaj aferoj.

Ĝi rilatas al la serĉo kaj evoluigo de kulturkoncepto, kiu orientiĝas je la gvidnocio de socio-ekologia daŭripovo. (14) Tio ĉi, apude de la duaranga rolo de teknologiaj novaĵoj, signifas estiĝon de konscio-valoriĝo de la homoj - mondscale en la senco de "universala mensostato" (Angle "global mindset"). Kultura daŭripovo konkretiĝas forme de "kulturoj de daŭripovo", t.e. de kulturoj, kiuj scias, ke la de la homo kaŭzita (kolapsiga) krizo estas krizo de la homa kulturo, t.e. de la homa racio-prudento (6). Ekkoneblas la normiga dimensio de la nocio "daŭripovo".

Ĉar la vorto "kulturo" devenas de la hindoeŭropa vorto "**kuel-**" = "**esti diligente okupata**", oni povus sin demandi, ĉu ĉikuntekste temas pri ekzistorilata krizo de la "diligenta okupateco" de la homo. La t.n. "**novigaĵoj**" kaj la **fiksiĝo je ekonomia kresko**, teknologio ĝenerale, merkato kaj profito ĝis nun gvidis la mondon nek al decide pli da justeco nek al "mezurebla" protekto de la vivmedio - ili pli facile akriĝis la tergloban krizon (15, 16).

Necesas **ŝanĝo de nia gvida paradigmo kaj de niaj valoroj** (6) – "kompreno pri daŭripovo, kiu krom la tri kampoj ekonomio, ekologio kaj socialo, ampleksas ankaŭ kulturon kiel kveran dimension, kiu komprenas-realigas diversece, malfermitece kaj interŝanĝ(em)e bazitan formadon de ĉi tri kampoj kiel kultur-etik-estetikan ĝisformadon de daŭripovo – kulturnocio, kiu devenas de la naturaparteneco de la homo kaj principe kunpensas la homon kaj naturon same ampleksantan vivokuntekston." (16, 17).

La evolucio ekipis la organizan homon per konscio, scio, konscienco kaj volo. Ĉi karakterizaĵoj povas bezonkaze krei novajn taksokriteriojn en teorio kaj praktiko, t.e. zorgi pro konscia ŝanĝo de la propra pensado kaj agado. Jen pri kio esence temas. **Ne estas ekstera daŭripova evoluo sen respektiva interna.**

Ĉefaj blokiloj en la transformado de scio-volo en agadon estas laŭ multaj enketoj:

1. La personaj kostoj,
2. la konsumkulturo kiel internigita kaj integra vivostilo,
3. la orientiĝo je la majorio kaj ties agadomodeloj kaj konvencioj,
4. la reciproka kulpigo inter politiko kaj civitanoj-civilsocio, kaj
5. la mondvaste mankanta mondvastasolidareco en la nuna generacio koncerne al aliaj samtempuloj en aliaj mondregionoj kaj al la venontaj generacioj.

**Kulturoj de daŭripovo baziĝas** i.a. sur la "Konvencio pri la Protekto kaj Progresigo de la Diverseco de Kulturaj Esprimformoj (UNESCO, 2005)", postulanta "integron de la kulturo en daŭripovan evolu(ig)on", sur sistema pensmaniero, sur la ideonivelo pri "senkondiĉa enspezo", sur konsekvenca partoprenigo de la civilsocio, sur kritikema partoprenado en demo- kaj biokratioj, sur kritikema (ne atakema) pritaksado de teknologioj kaj amasmedioj, sur protekto kontraŭ patentoj pri genomoj, sur kulturo de malplio kaj sur la integrado de la potencialo de la artoj (18, 19) ktp., kaj finfine ankaŭ sur la daŭripovo de la kulturo mem (t.e. ekologie daŭripova realigado de kulturprojektoj kiel ekz. Esperanto). La KdD unusignife kontraŭas dominon de la ekonomio, de la konsumo kiel esprimo de homa libereco (kvazaŭ civitana devoligo al kaj motoro de la konscia kaj ĉiam plifortigata kreskomodelo de la superrega "homo oeconomicus").

La kerna problemoj estas: "**Kiel atingi de la ekonomikcentrigita kulturo de globaligo social-ekologian kulturon de daŭripovo**" (= transformadon de la socio). "Kiaj organiz- kaj komunikadformoj subtenas-progresigas kulturan diversecon anstataŭ detruigi ĝin? Daŭripovo bezonas ne nur novajn paradigmojn, mondkonceptojn kaj valorojn (= kulturojn de daŭripovo), sed ankaŭ novajn formojn de komunikado (= kulturajn strategiojn de daŭripovo), kiuj konstante progresigas kulturan evoluon kaj malhelpas la realigon de memreferencemaj kulturprocesoj ("merkato", "progreso", mono, socialkontroloj, teknologioj, armiloj, demokratio (!), kulturinterŝanĝoj kiel ekz. ankaŭ Esperanto) kiel logiko de "kulturo de kreskado". (6) Konstatendas ĉikuntekste, ke la Brundtland-Raporto kaj la el tiu evoluigita Agendo 21 persistas pri la tezo pri la nerezignebleco de ekonomia kresko. Intertempe ŝajne estas fakto, ke korektoj koncerne la ekzistantajn nedaŭripovajn produktado- kaj sociomodelojn estas farataj nur por iln kontinuari. Deĝi de tio estas nun unu el la ĉefaj taskoj de la kulturoj de daŭripovo. (6, 20).

Reduktita al la pli praktika menciindas la kvar **ekologiaj ĉefprincipoj** regenerado, substituado, adaptado kaj riskoevitado laŭ la tri vivmedipolitikaj ĉefprincipoj antaŭzorgado, kunlaborado kaj la principo de kaŭzulo.

Estas **tri alpaŝoj influi-ŝanĝi la nuntempan detru(em)an sistemon-mensostaton**:

1. La politika (ĉefe pere de ŝanĝoj de impostoj),
2. la struktura (ĉefe pere de ŝanĝoj en la infrastrukturoj),
3. la kultura (ĉefe pere de ŝanĝoj en la mensaj vivstilkonceptoj).

**Kulturo, lingvo kaj komunikado** estas decidaj kampoj de la homa ekzisto. Sed sendepende de siaj detalaj difinoj, ili devas akcepti esti mezurataj per la principoj de social-ekologia daŭripovo (kp. la koncepton-uzon de interreto, de lingvoservoj, de la Esperanto-Movado, de infrastrukturoj kaj realigmanieroj ene de la kultur- kaj sportindustrio). **Kulturo ne pravigas vivmediodetruon**, jen la moto. La nedaŭripovaj, vivmedie minacaj efikoj de aplikata kulturo estas facile ekscieblaj en la interreto. Tiu lasta mem intertempe produktas mondvaste tiom da karbondioksido kiom la tuta monda aertrafiko, kun altiĝa tendenco.

Simila validas por la produktado-konsumo-uzado de elektronikaĵoj (t.n. "diĝita toksado") kaj de papero en informado, komunikado, varbado ktp. kaj por la "malpura turismo". En la t.n. "Marakeŝ-Poroceso" de la vivmediprogramo de la UN, kiu okupiĝas pri progresigo de daŭripovaj konsum- kaj produktmodeloj, komunikado estas nun unu de la pivotaj temoj. (21) Aparte de tio estas kelkaj efikaj metodoj por sufiĉe detale kaj precize mezuri la ekologian adekvatecon de la propraj agoj kaj produktoj (vd. la "ekologian piedpremsignon", la "ekologian dorsosakon", la "virtualan akvon", internaciajn kaj naciajn indikilojn pri malriĉeco, sanindikilojn ktp.).

Ĉi tie konkretiĝas la koncepto de la "**triopo de la strategioj pri daŭripovo**":

1. **Konsisteco**, t.e. daŭripovo kiel principo.
2. **Efikeco**, t.e. elekto de la plej energi- kaj resursoŝparaj opcioj por iu celo, kaj
3. **Sufiĉeco**, t.e. atento pri la ĝustaj mezuroj kaj limigoj . (22)

La konceptoj de **resilienco** kaj **lezebleco** estas novaj aspektoj koncerne daŭripovon kaj konsistas el la ĉefaj nocioj de "rezistopovo kaj lernkapablo" de sistemo kontraŭ perturboj kaj streso. Ili priskribas adaptopovon de sistemo en la senco de "fleksebla krizostabileco", fidanta al la kapabloj de la sistemo bufri ŝanĝiĝojn de siaj statovariabloj, stimuloj kaj parametroj kaj al la adaptopovon de la trafitaj ĉefroluloj. Koncerne konsideremon de la rezistoparametroj kaj lernkapabloj ĉi koncepto bone taŭgas, sed estas duboj, ĉu la iom implicita neglekto pri preventivo kaj antaŭzorgado de la sistema stabileco (ekz. de la biosfero) fine ne pligravigas problemojn-krizojn. La kombino de ambaŭ ŝajne estas futurinda solvo.

Pliaj konceptoj rilate la kuntekston de "**kompetenta kulturo de malplio**" estas la principo de preventado kaj la maksimumo "En kazo de dubo: Ne!". Ĉi lasta signifas, ke la malutilo de iu rimedo-paŝo ne devas esti science pruvata 100%e por sin deteni de ĝi (kp. la eternan diskuton pri la "Formula 1" k.s.).

La **enordigo de Esperanto**, aparte de ties organizita-organizanta Movado kadre de "nepotaŭga" nuna-estonteca social-ekologia daŭripova evol(ig)o ne estas malfacila. Distingeblas tri al aplikata Esperanto imanentaj elementoj, kiuj determinas-difinas ĝin kiel social-ekologie daŭripova. Ĉi kriterioj kaj akordiĝas kun la UN-gvidprincipoj kaj konsistigas moderne adaptitan formon de la "interna ideo", pliampleksigita per la ekodimensio.

Transe de materialaj-konkretaj aspektoj Esperanto kompreneblas kiel intera komunikado, kiu plenumas postulojn, esencajn por la ekologio kiel sistema tuto de la interrilataro de ĉio viva, ĉikaze aparte de la pensa viva.

Male al ĉiuj etnaj lingvoj Esperanto estas social-ekologie daŭripova rimedo de (inter-)komunikado ĝuste pro tio, ke ĝi pro si mem estas preventiva. Nur tre malmultaj homaj eltrovaĵoj povas aserti pri si. Ĉi tiu **imanenta daŭripovo** prezentiĝas en tri formoj:

1. **Integra Lingveco** (unuiga-kunliga transkultureco),
2. **Demokratia dulingveco** (egaleca justeco), kaj
3. **Ekologia konformeco** (biosfera stabileco). (23, 24)

La aktuala difino-priskribo de Esperanto tekstas do jene:

**"Esperanto estas la lingva formo de social-ekologie daŭriŭpova internacia kaj transkultura komunikado."**

Samkiel en nia epoko de interdependa tergloba kulturo la distingado inter la propra-mema kaj la alia-fremda ofte ne plu validas kaj estiĝas integr(em)a **transkultureco** kun novaj identecoj (25), la **transdisciplineco** kreas disciplinon-sintenon-arton de integrado, kiu laŭ

memevidentaj reguloj kreas el diverseco de disciplinoj unuon pro eltrovo de novaj komunaj esencoj, de unuo transe de la devenkampoj (samkiel ĉiu infano estas nova unuo transe de la unuoj de siaj patrino kaj patro).

La "kulturoj de daŭripovo" estas ĝuste pro sia **transa**, t.e. aŭtentike tutmonda, universala koncepto de daŭripovo praekzemplo de transkultureco kaj transdisciplineco. Esperanto estas laŭ sia trea naturo (ne nepre laŭ siaj aplikoj) modelo de ĉi koncepto.

La plej konata kaj ampleksa prezentaĵo de transdisciplineco, kiu ampleksas ankaŭ transkulturecon, estas la "**Ĉarto pri Transdisciplineco**" (26) el la jaro 1994. Mallonge ĝi konsistas el jenaj centraj punktoj:

1. La homo ne submetiĝu al reduktiva analizo.
2. Estas diferencaj niveloj de la realo kaj logiko.
3. Transdisciplineco kompletigas disciplinojn, strebas al montrado kaj de la komuna kaj de la transa.
4. La pivoto de transdisciplineco estas la semantika & praktika unuiĝo de la signifoj, kiuj iras tra kaj troviĝas transe de diferencaj disciplinoj.
5. Transdisciplineco ampleksas ankaŭ la kampojn transe de la ekzaktaj sciencoj kiel ekz. la artojn kaj spiritecaj kampoj, ĝi postulas interan dialogon.
6. Transdisciplineco estas multreferenca, plurdimensia, transhistoria.
7. Transdisciplineco ne estas (nova) superscienco, religio aŭ filozofio.
8. Transdisciplineco agnoskas la rajton de homo pri nacieco kaj aparteneco al la Planedo Tero.
9. Transdisciplineco kondutas malfermite al religioj, mitoj ktp.
10. Transdisciplineco estas imanente transkultura.
11. Transdisciplina edukado revalorigas la rolojn de intuicio, imaginado, sentemo kaj korpo.
12. Transdisciplineca ekonomio servas la homon, ne la ekonomion.
13. Transdisciplina etiko kontraŭas ĉiun sintenon, kiu rifuzas dialogon kaj diskuton.
14. Rigoro en argumentado (por eviti distordojn-falsojn), malfermiteco pri la nekonata kaj toleremo kontraŭ la alia estas fundamentaj karakterizaĵoj de transdisciplineco.

Koncerne de **lingvoj, artoj kaj valoroj en la dialogo de kulturoj** la supre prezentita donas la esencajn vidpunktojn kaj gvidliniojn pri valoroj de la t.n. postmoderna socio. Baze temas pri etiko de transkultureco aŭ etiko de interkultura dialogo kiel principaro, al kiu povas submetiĝi ĉiuj kulturoj en la senco de interkonsentebla (kaj interkonsentita) monda etoso. (27) Ĉi-tekste oni pledas por la unuarangeco de la valoroj laŭ la tri gvidprincipoj de la UN.

Antaŭkondiĉo de ĉiu futurinda dialogo inter la kulturoj sub konsidero de lingvoj, artoj kaj valoroj estas ekz. la etikaj principoj de la t.n. **permakulturo**, kiu celas kreadon de kontinue funkciantaj, daŭripovaj kaj naturproksimaj cirkuladoj: 1. Zorgema rilato al la Tero (ekologia komponanto, celanta la rilaton al la naturaj vivofundamentoj), 2. Zorgema rilato al la kunhomoj (sociala komponanto, celanta la rilaton al memdeterminado, homaj rajtoj kaj devoj) kaj 3. Honesta interŝanĝo de resursoj (ekonomia komponanto, celanta la rilaton al la limigiteco de la materialaj kaj sistemaj resursoj de la Planedo kaj la justa distribuo de resursoj kaj materialokoncernaj ebloj). (28) Ĉi koncerne menciindas la **Ĉarto de la Tero** (29), deklaracio pri bazaj efikaj principoj por tutmonda daŭripova evoluo, origine iniciata de la UN.

**Lingvoj, artoj kaj valoroj en la dialogo inter kulturoj** grave rilatas al universala solvo de la problemoj de la krizoj pri sociala justeco kaj ekologia stabileco. Ili koncernas la kulturajn identecojn (t.e. valorkoncernajn sindevoligojn) kaj diferencojn de individuoj kaj kolektivoj.

Identecoj ĉiam prezentiĝas kiel hierarkio de identecoj, ekz. esti ekologo, terano, esperantisto, eŭropano, germano, socialisto, artisto, patro, poŝtmarkokolektisto ktp. Depende de la socialigo-kulturo-medio kaj personaj travivaĵoj establiĝas tre diferencaj identecoj - pli tradiciaj, kiuj ne multe problemigas la propran fonon kaj pli malfermitaj kaj/aŭ per suferoj formitaj, kiuj uzas memidentecon kiel bazon de memdefendado ktp. Principe oni nuntempe devenas de la fakto, ke **"homoj estas diversmaniere diferencaj"** kaj ke la nocio de la **kultura identeco** ne bone taŭgas por prognozi la konduton de kulture difinitaj kolektivoj. (30)

Jen la difino de UNESCO pri kulturo: "La kulturo povas plejlarĝsence rigardata kiel tuto de la unikaj spiritalaj, materialaj, intelektaj kaj emociaj aspektoj, kiuj markas socion aŭ socialan grupon. Tio ĉi inkludas ne nur arton kaj literaturon, sed ankaŭ vivoformojn, la fundamentajn rajtojn de la homoj, la valorsistemojn, tradiciojn kaj kredojn." (31) Ĉi nocio multe helpas trovi aspektojn de kulturo, kiujn povas kundiĉi la majorio de la homoj. Certe la tri neintertrakteblaj gvidprincipoj de la UN (paco, homaj rajtoj kaj daŭripovo) kaj la "Ĉarto pri Transdisciplineco" estas bonaj helpiloj cele peradon de aŭ edukadon al kompetenteco pri interkultura dialogo. La koncepto **"unuigo en diverseco"** estas priskribo de komuna principo, kiu ligas diferencajn kulturojn en la serĉado pri la komuna origino. Ĉikoncerne la arto de verkado okupas apartan lokon, ĉar la poezio estas rigardata kiel plej proksima al la kreiva pensado, kies principo ja estas la sama ĉe ĉiuj popoloj kaj individuoj. (32)

**Lingvoj** estas lingva, kultura, socia kaj, kaze de Esperanto, ankaŭ ekologia fenomeno. Ili estas ne nur komunikiloj, sed ankaŭ portantoj de identecoj, valoroj kaj ideologioj. (33) Biologia diverseco necesas por la evolucio en la naturo, kultura diverseco por la evolucio de la kulturo. Gravas la fakto, ke tradiciaj-indiĝenaj-surlokaj lingvoj estas tre intense ligataj al la respektiva ekosistemo. Ĉefaj kialoj por la minaco al lingvoj estas la tutmondigo, politika premo kaj ekonomiaj avantaĝoj. La oficiala strategio de la UNESCO estas duvoja: 1. Protektado-konservado de la tergloba lingvodiverseco kiel antaŭkondiĉo de kulturdiverseco kaj 2. Progresigo de plurlingveco kaj tradukado (ene de publikaj instancoj, klerigaj sistemoj, amasmedioj, kiberspaco ktp.) Grava celo estas la evoluigo de tutmonda tradukpolitiko, ankaŭ por kontraŭstari la superregan pozicion de la Angla kiel devenlingvo de tradukoj (ĉ. 55%). Plurlingveco estas la deklarita celo de la Eŭropa Unio por 3 celoj: 1. Stimulado de konkurenckapablo, ekonomia kresko kaj plenokupiteco, 2. Progresigo de dumviva lernado kaj de la interkultura dialogo kaj 3. Estigo de spaco por la Eŭropa Dialogo kaj komunikado kun la civitanoj. (34) Oni ja bone ekkonas, ke lingvopolitiko servas ankaŭ por celoj, kiuj estas potenciale biosferodetruaj, kiel ekz. la paradigmo de "ekonomia kresko". (Tio memorigas pri la eldiraĵo de Herman Daly, Usona ekonomiisto: "Fari eĉ pli bone ion, kion oni dekomence tute ne faru, estas tre perversa formo de progreso!")

Koncerne **arton** validas la aserto de Heinrich Boell: **"La arto ne bezonas liberecon. Ĝi estas libereco.** Oni povas forpreni al ĝi la eblon montriĝi, liberecon doni al ĝi neniu povas." (35) La moto de la Viena Secesio tekstas "Al la epoko sia arto. Al la arto sia libereco." (36) Jen grava rilato inter artoj kaj valoroj, kiu multsignife rolas ankaŭ en la dialogo inter kulturoj. La anarkistoj atentigas pri la fremde determinita konsumkaraktero de la nuntempa arto, kiu ("intence") subpremadas, ke jam ekzistaj internaj bezonoj kaj sopiroj kreive elmergiĝas kaj kondukas al ŝanĝo de aktualaj vivkondiĉoj en la senco de kulturevolucio. (37) Arto laŭ sia trea naturo kombinas sciojn, konsciencon, sensecon-emocion-empation, estetikon kaj lertecon al materiala aŭ eventa verko. Tiu prezentiĝas al estiĝo de mensa malfermiteco kaj respekto kaj transe de la artista kreivo invitas al kreiva samtempa spertado de la arto kaj de la individuaj kaj kolektivaj memoj (38), plenumante la eldiraĵon de Joseph Beuys, iniciatinto de la koncepto pri la "sociala skulpturo" (39): **"La artaĵo estas la plej granda enigmo, sed la homo estas la solvo."** Inter- kaj transkultura kultur- kaj artlaboro signifas produktivan perceptadon de diferencoj kaj dialog(ig)an ŝancon reflekti fremdan kaj propran

kulturon (38). Ĉikuntekste montriĝas rilatoj al la t.n. "**mensigo**" de la moderna psikologio, kiu signifas "vidi sin mem de ekstere kaj la alian de interne". (40)

Ĝuste la **kunfluado de intelektaj-raciaj kaj sensaj-empatiaj trajtoj** en la artoj estas tio, kio (ĝis nun) mankas en la evoluo-evoluigo de la koncepto "daŭripovo". Ĉi manko baradas la vojon de scio pri kaj volo je daŭripovo al ĉicela agado. Esperendas, ke la homaro ne devas atendi finan kolapson por trovi vojon, kiu gvidas ĝin al justa vivo en sana vivmedio.

### **RESUMO KONCIZA**

- La koncepto kaj la bazoj de la "Kulturoj de Daŭripovo (KdD)" fone de la gvidprincipoj de la UN, paco, homaj rajtoj kaj daŭripovo-daŭripova evolu(ig)o.
- La rilatoj de la KdD al la krizoj de sociala justeco kaj ekologia stabileco, temas pri estiĝo de nova social-ekologie determinataj konscio kaj paradigmo.
- Ĉefaj blokiloj por daŭripova evoluo.
- Tri alpaŝoj (strategioj) por daŭripova evoluo.
- La koncepto de resilienco.
- Paŝoj por influi-progresigi daŭripovan evoluon.
- La rolo de kulturo, lingvo kaj komunikado. Kulturo ne pravigas vivmedidetruson.
- Enordigo de Esperanto en la KdD, la ekologie daŭripova difino de Esperanto kiel "lingva parto de social-ekologie daŭripova internacia kaj transkultura komunikado".
- Transdisciplineco kiel centra pivoto dedecidaj valoroj universalaj.
- Lingvoj, artoj kaj valoroj en la dialogo inter la kulturoj, fundamentaj kriterioj, homoj kiel diversmaniere diferencaj.
- La difino de UNESCO pri kulturo.
- Pri lingvoj, aparte multlingveco, aparte en la EU.
- Pri arto kiel libereco ktp. kaj mensigo.
- La esenca manko en la difino de daŭripovo: nekombino de racio kaj empatio.

7

Wolfgang Guenther (UEA, SAT, AVE, Nula Horo)  
Esperanto-Centro Harleshausen  
Wilhelmshöher Weg 11  
34128 Kassel, Germanio

w.guenther.esperanto@web.de

2015. Feb.18

## Literaturo

- (1) Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE), [ave@verduloj.org](mailto:ave@verduloj.org)
- (2) Agendo21, [www.un.org/depts/german/conf/agenda\\_21.pdf](http://www.un.org/depts/german/conf/agenda_21.pdf)
- (3) W. Guenther, Ĉu la nepoj nin benos Streboj al daŭripova estonteco. Ni mem ja jam estas la nepoj, pri kiuj temas. Prelego. Ĉe la aŭtoro. (Tie ampleksa literaturlisto.)
- (4) [http://www.nachhaltigkeit.info/.../weltgipfel\\_rio\\_de\\_janeiro\\_1992\\_539...](http://www.nachhaltigkeit.info/.../weltgipfel_rio_de_janeiro_1992_539...)
- (5) <http://de.wikipedia.org/wiki/Drei-Saeulen-Modell>
- (6) D. Brocchi, Die kulturelle Dimension der Nachhaltigkeit, 2008, <http://www.magazin.avinus.de/2008/01/26/brocchi-kulturelle-nachh...>
- (7) [www.unesco.de/fileadmin/medien/Dokumente/unesco.../uh\\_2\\_2011.pdf](http://www.unesco.de/fileadmin/medien/Dokumente/unesco.../uh_2_2011.pdf)
- (8) G. Zeitler, Wirtschaft und Biosphäre, <http://gerdzeitler.wordpress.com/wirtschaft-und-biosphaere>
- (9) [www.clubofrome.de/aktuelles-2010.html](http://www.clubofrome.de/aktuelles-2010.html)
- (10) [unesdoc.unesco.org/Ulis/cgl-bin/ulis.pl?...gp](http://unesdoc.unesco.org/Ulis/cgl-bin/ulis.pl?...gp)
- (11) [www.jenseits-des-wachstums.de/index.php?id=85358&L=28id=8535.26](http://www.jenseits-des-wachstums.de/index.php?id=85358&L=28id=8535.26), <http://iisd.org/sd/>
- (12) Vermont FolkLife Center, Culture Sustainability Institute, Sequestering Tradition? A Culture Sustainability Symposium, 2013, Starling College, Vermont, [www.vermontfolklifecenter.org/.../cultural\\_sustainability..](http://www.vermontfolklifecenter.org/.../cultural_sustainability..)
- (13) [www.bne-portal.de/.../2011\\_Unesco\\_heute\\_Nachhaltige\\_Entwicklung.pdf](http://www.bne-portal.de/.../2011_Unesco_heute_Nachhaltige_Entwicklung.pdf)
- (14) S. Kagan, Cultures of Sustainability and the aesthetics of the pattern that connects, FUTURES, The Journal of policy, planning, and future studies, Vol.42, 2010
- (15) The closing circle neu gelesen, [www.umweltethik.at](http://www.umweltethik.at)
- (16) H. Kurt, B. Wagner (Hrsg.), Kultur, Kunst, Nachhaltigkeit, Essen, Klartext Verlag, 2002, vgl.hierzuTutzinger Manifest, Evangelische Akademie Tutzing, 2001, [www.kupoge.de/ifk/tutzingermanifest](http://www.kupoge.de/ifk/tutzingermanifest)
- (17) L. Krainer, R. Trattning (Hrsg.), Kulturelle Nachhaltigkeit, oekom 2007, ISBN 978-3-86581-080-9
- (18) S. Kagan, V. Kirchberg (Hrsg.), Sustainability: a new frontier for the arts and cultures, VAS, ISBN 978-3-888864-440-5
- (19) S. Kagan, Art and Sustainability, transcript, 2011, ISBN 978-3-887-21803-7
- (20) D. Brocchi, Die sozialen Grenzen der Nachhaltigkeit, [www.davidebrocchi.eu/...2009\\_soziale\\_grenzen\\_nachhaltigkeit.pdf](http://www.davidebrocchi.eu/...2009_soziale_grenzen_nachhaltigkeit.pdf)
- (21) [www.bmu.de/produkte\\_und\\_umwelt/internationale\\_aktivitaeten\\_auf\\_un\\_ebene/doc/39053.php](http://www.bmu.de/produkte_und_umwelt/internationale_aktivitaeten_auf_un_ebene/doc/39053.php)
- (22) [www.oeko.de/OEKODOC7!\\$!\(7"=!!-\\$\\$/-DE:PDF](http://www.oeko.de/OEKODOC7!$!(7)
- (23) W. Guenther, Esperanto 3013 – kien., KIOSKO7, Esperanto-Eldonejo Nula Horo, 2013, ISBN 97839814988-1-3
- (24) W. Guenther, Esperanto kaj kulturoj de daŭropoveco – Fono kaj nocioj koncerne la argumentadon pri ekologia identeco de la neŭtrala internacia lingvo Esperanto, KIOSKO7, Esperanto-Eldonejo Nula Horo, 2013, ISBN 978-3-9814988-1-3 (Ampleksa bibliografio)
- (25) W. Welsch, Transkulturalität, Institut für Auslandsbeziehungen (Hrsg.), Migration und kultureller Wandel, Schwerpunktthema der Zeitschrift für Kulturaustausch, 45. Jg., 1995/1. Vj., Stuttgart 1995
- (26) Ĉarto pri Transdisciplineco (versioj en 10 lingvoj), [ciret – transdisciplinarity.org/index\\_en.php](http://ciret-transdisciplinarity.org/index_en.php)
- (27) Weltethos, [www.global-ethic-now.de/gen...weltethos/.../0a-00-was-ist-weltethos.php](http://www.global-ethic-now.de/gen...weltethos/.../0a-00-was-ist-weltethos.php)
- (28) [http://permakultur-akademie.de/front\\_content.php?idcat=126](http://permakultur-akademie.de/front_content.php?idcat=126)
- (29) [www.earthcharterinaction.org/.../Read-the-Charter.h...](http://www.earthcharterinaction.org/.../Read-the-Charter.h...), en Esperanto: [eo.wikipedia.org/wiki/Ĉarto\\_de\\_la\\_Tero](http://eo.wikipedia.org/wiki/Ĉarto_de_la_Tero)
- (30) Kulturelle Identität, [http://de.wikipedia.org/wiki/Kulturelle\\_Identitaet%C3%A4t](http://de.wikipedia.org/wiki/Kulturelle_Identitaet%C3%A4t)
- (31) [www.bak.admin.ch/themen/04117/index.html](http://www.bak.admin.ch/themen/04117/index.html)
- (32) Schiller-Institut, Wie wir den Dialog der Kulturen verstehen, <http://schiller-institut.de/seiten/dialogderkulturen/dialog2.htm>
- (33) UNESCO-Weltbericht "In kulturelle Vielfalt und interkulturellen Dialog investieren", UNESCO, 2009, ISBN 978-3-940785-19-0
- (34) Hocharangige Gruppe "Mehrsprachigkeit", Abschlussbericht, [www.eu-bildungspolitik.de/...mehrsprachigkeit/2007\\_hocharangigegruppe...](http://www.eu-bildungspolitik.de/...mehrsprachigkeit/2007_hocharangigegruppe...)
- (35) Heinrich Boell, Die Zeit, Nr. 40, 30. Sept. 1966, S. 16, [http://www.zeit.de/1966/40/die\\_kunst\\_muss\\_zu\\_weit\\_gehen](http://www.zeit.de/1966/40/die_kunst_muss_zu_weit_gehen)
- (36) Wiener Secession, [de.wikipedia.org/wiki/Wiener\\_Secessionsgebäude](http://de.wikipedia.org/wiki/Wiener_Secessionsgebäude)
- (37) Kunst und Freiheit – Anarchistischer Funke, <http://7afunke.blogspot.de/theorei/kunst-freiheit/>
- (38) Xuan Gao, Interkulturelles Verstehen durch Kunst, München, 2009, [edoc.ub.uni-muenchen.de/10388/!7GAO\\_Xuan.pdf](http://edoc.ub.uni-muenchen.de/10388/!7GAO_Xuan.pdf)
- (39) Joseph Beuys, Künstler, Krieger, Schamane, Psychosozial Verlag, 2009, ISBN 9783898068352
- (40) Mentalisierung, Ein neues Konzept der Psychoanalyse und Psychotherapie, [mentalisierung.net](http://mentalisierung.net)